

003.62 : 408/409

PRI LA LITERSIMBOLOJ POR LINGVOJ
(EUGEN WÜSTER, Aŭstrio)

Diversaj legantoj de »Scienca Revuo« petis min, esprimi mian opinion pri la artikolo, kiun D-ro Albault publikigis en »Scienca Revuo« (1964, p. 3—12).

La kerno de la problemo tuŝita de D-ro Albault povas esti reduktata al la jena formulo:

Se esperantisto bezonas lingvo-simbolojn por uzo en verko destinita por esperantistoj, nenio malhelpas lin uzi sistemon bazitan tute sur la esperantaj nomoj de la lingvoj.

Se kontraŭe esperantista terminologo partoprenas en la preparado de multlingva vortaro destinita por nacia aŭ internacia publiko, ĉefe ne-esperantista, li devas neeviteble uzi la sistemon akceptitan per internacia konvencio (inter ISO, UNESCO, la naciaj asocioj de normigo kaj multaj alaj internaciaj organizaĵoj).

Ĉiu esperantisto de la dua kategorio do devas decidiĝi inter du eblecoj: Ĉu li uzu la ne-esperantistan sistemon por ambaŭ dirlitaj celoj, aŭ ĉu li uzu alterne du malsamajn sistemojn?

Tiu principa demando devus esti decidita antaŭ ĉio. Ĝi estas sole demando de oportuneco. Diskutoj pri detaloj de la du sistemoj devus okupi nur la duan rangon.

Simila problemo povus ekzisti ankaŭ koncerne ĉiujn aliajn simbolojn bazitajn sur internaciaj konvencioj: Ĉu esperantistoj uzu paralele »Ku« kaj »Cu« (por kupro), »T« kaj »E« (por la elektra tensio), »GE« kaj »D« (por Germanujo)?

Sed tian problemon ĝis nun neniu sentis kaj elmontris koncerne la internaciajn simbol-sistemojn de la kemio, fiziko, turismo ktp. Kial? Ĉar la plejparto de tiuj internaciaj sistemoj ekzistis jam antaŭ Esperanto. Por la lingvoj kontraŭe estis esperantistoj, kiuj kreis la unuan supernacian sistemon de mallongaj liter-simboloj.

Kaj efektive: Kvankam la sistemo de ISO estas kompromiso inter la deziroj de la subsignintaj organizaĵoj, tamen la ĉefaj trajtoj de la esperanta sistemo estis trovataj indaj de ĉiuj, por esti adoptataj por la norma sistemo.

003.62 : 408/409 (049)

LA INTERNACIAJ SIMBOLOJ POR LINGVOJ
Rezolucio de la Terminologia Centro (dipl. ing. R. Haferkorn)
(ISAE-TC-112)

Aldone al la artikolo ESPERANTAJ SIMBOLOJ POR LINGVOJ de D-ro A. Albault (Sc. Rev., Vol. 14, n-roj 53/54, p. 3) kaj al la artikolo LA INTERNACIAJ SIMBOLOJ POR LINGVOJ de D-ro tek. n. E. Wüster (Sc. Studoj, Vol. 1958, p. 47) la Terminologia Centro (ISAE kaj Akad. de E.) aperigas la ĉi suban indekson de lingvoj ordigitan laŭ lingvofamilioj, kiel ili troviĝas en la »Konciza Eldono« de la tabeloj de la **Universala Dekuma Klasado (UDK)**. En tiu Konciza Eldono mankas detalaĵoj por la afrikaj lingvoj kaj idiomoj (UDK = 96). Pro tio ni krom tio aldonas tiurilatan pli detalan UDK-indeksan enhavantan la esperantaj tradukojn kiujn proponis dipl. ing. C. Naoumoff (Parizo).

La Terminologia Centro (T. C.) komence ja aplikis en siaj bibliografioj ankaŭ la sistemon proponitan de Albault, do uzis tiajn simbolojn kiuj baziĝas sur la esperantaj lingvonomoj. Poste Wüster konvinkis la Direktoron de T. C., (ke estu plej praktike, konformigi la bibliografiajn indikojn de la Esperantistoj al tiuj de la internacia sistemo, do al la simboloj rekomenditaj de la **Teknika Komitato ISO/TC 37 «Terminology»** de INTERNATIONAL ORGANIZATION FOR STANDARDIZATION (ISO). Pro tio tiujn internaciajn simbolojn jam entenis la INDEKSO DE LA SCIENCAJ, TEKNIKAJ KAJ CETERAJ FAKVORTAROJ EN ESPERANTO publikigita en S. R. 12, n-roj 47/48, p. 118. Ankaŭ en la ĉi suba indekso estas uzataj la simboloj de ISO; ni tie baziĝis sur la dua antaŭprojekto de ISO/TC 37 (Secrétariat — 81) 144 F de la 1-a de Aŭgusto 1963, kiu reprezentas kompromison inter la malnova ISO-sistemo (baziĝanta sur la latinaj aŭ moderne-internaciaj nomoj) kaj la propono de Holmström (baziĝanta sur la nacipropra — indiĝenaj — lingvonomoj). Oni ordinaras uzas unuliterajn simbolojn por la dek ĉefaj lingvoj (C, D, E, F, G, I, J, L, R, S) — nur laŭbezone oni tie uzas duliterajn (Ch, De, En, Fr ktp.) — kaj duliterajn simbolojn por aliaj naciaj lingvoj (Af, Ar, Bg, Cs, Da ktp.).

T. C. preferas, konforme al la rekomendo de Wüster, provizore uzadi en la esperantaj bibliografioj kaj terminaroj la sistemon de ISO/TC 37, dum la Internacia Lingvo ankoraŭ ne estas la oficiala lingvo en internaciaj rilatoj.

LA LINGVOJ ORDIGITAJ LAŬ LINGVOFAMILIOJ

kaj iliaj signoj (mallongigoj, simboloj) fiksitaj de la komitato ISO/TC 3 kaj uzataj ankaŭ en la fakvortara bibliografio Esperanta de R.. Haferkorn, Terminologia Centro

Rim.: La mallongigoj fiksitaj de ISO ĝenerale baziĝas sur la nacipropraj lingvonomoj. La »grandajn« lingvojn oni ordinare mallongigas per unu litero, la ceterajn per dulitera signo.

Lingva familio	UDK-indico	lingvonomo		signo far provi-ISO/TC zora 37 signo
		franca	esperanta	
INTERLINGVOJ =089	=089.2 =089.6 =089.7	Esperanto Interlingue (Occidental) Interlingua		Eo Ie Ia
ĜERMANAJ LINGVOJ =2/3	=20 =30 =393.1 =393.6 =396 =397 =398	Anglais Allemand Néerlandais Afrikaans Norvégien Suédois Danois	angla germana nederlanda afrikansa norvega sveda dana	E, En D, De Nl Af No Sv Da
ROMANAJ LINGVOJ =4/6	=40 =499 =50 =590 =60 =690	Français Catalan Italien Roumain Espagnol Portugais	franca kataluna itala rumana hispana portugala	F, Fr — I, It Ro S, Sp, Es Pt
KLASIKAJ LINGVOJ =7	=71 =75	Latin Grec	latina greka antikva g. novgreka	L, La G, Gr aG nG
SLAVAJ LINGVOJ =8	=80 =83 =84 =85 =854 =861 /862 =863 =867 =882 =883	Russe Ukrainien Polonais Tchéque Slovaque Serbo-Croate Slovéne Bulgare Lithuanien Lettonien	rusa ukraina pola ĉeĥa slovaka serbokroata slovena bulgara litova letona, latva	R, Ru Uk Pl Cs Sk Sh Sn Bg Li Le

Lingva familio	UDK-indico	lingvonomo		signo far ISO/TC
		franca	esperanta	
HINDO-EŬROPAJ kaj HINDO-IRANAJ LINGVOJ =91	-912.3 -914.3 -914.31 -915 -916.9 -919.8 -919.89	Sanskrit Hindi Urdu Persan Basque Arménien Albanais	sanskrita hinda urdua persa, irana vaska armena albana	Sa Hi Ur Pe — An Al
HEBREA LINGVO =92	-924 -927	Hébreu Arabe	hebrea araba	He Ar
AMITAJ LINGVOJ =93	-931 -932	Egyptien Copte	egipta kopta	— —
URAL-ALTAJAJ kaj IZOLITAJ LINGVOJ =94	-943.5 -945.11 -945.41 -945.45	Turc Hongrois Finnois Estonien	turka hungara finna estona	Tr Hu Fi Et
AZIAJ LINGVOJ =95	-951 -956	Chinois Japonais	ĉina japana	C, Ch J, Ja
AFRIKAJ LINGVOJ =96	-961 -962 -963 -965.1	Lanqun de la Hottentots Lanque des Boschimans Bantu Langues nubiennes	nama'a lingvo de la Boŝmanoj banatu'a nubiaj lingvoj	Na Bn Bu Nu
MALAJAJ-POLINEZIAJ LINGVOJ =99	-992.21	Indonésien	indonezia, malaja	In

NOMOJ DE AFRIKAJ LINGVOJ KAJ IDIOMOJ

tradukitaj de dipl. ing. C. Naoumoff

laŭ eltiraĵo el **Classification Décimale Universelle**

Volume I á III, Publication de l' I. I. B. N^o 151

Institut International de Bibliographie

Palais Mondial — Bruxelles, 1927—1929.

UDK-indico	franca nomo	esperanta nomo
=960/965	Langues de l'Afrique	Afrikaj lingvoj
=960 (73)	Langues Noirs, des Nègres	Dialektoj negraj en Usono
=961	Dialectes négres aux Etats-Unis (africo-américain)	(afriko--amerikana)
=961.1	Langue des Hottentots	Lingvo de la Hotentotoj
.2	Dialecte Nama	Nama-a dialekto
.3	Dialecte Kora	Kora-a dialekto
=962	Hottentot du Cap	Hotentota lingvo de Kablando
=963	Langue des Boschimans	Lingvo de la Boŝman-oj
=963.1	Langues du groupe Bantou.	Lingvoj de la grupo Bantu-o.
=963.2	Langues dites des Cafres	Lingvoj de la Kafr-oj
=963.3	Branche de l'Est	Branĉo de la Oriento
=964	Branche du Centre	Branĉo de l'Centro
	Branche de l'Ouest	Branĉo de la Okcidento
	Idiomes divers parlés par les négres	Diversaj idiomoj parolataj de la negroj
	On a établi une simple énumération de groupes qui ne constitue en rien les ramifications d'une même souche linguistique. Le sous-classement est centésimal	Oni nur starigis elnomantan liston da grupoj kiuj tute ne montras la disbranĉiĝojn de iu ajn komuna lingva deveno. La subklasifiko estas centona.
=964.11	Wolof	Volof-o
.12	Groupe Mandé	Grupo Mande-a
.13	Groupe Féloup	Grupo Felup-a
.14	Sourai	Surai-o
.15	Haousa	Haŭza-o
.16	Groupe Bournou	Grupo Burnu-a
.17	Groupe Krou	Grupo Kru-a
.18	Groupe Egbé ou Evé	Grupo Egbea aŭ Eve-a
.19	Ibo	Ibo-o
.21	Mitchi	Miĉi-o
.22	Groupe Mosgou. Noupé	Grupo Mosgu-o. Nupe-o
.23	Baghirmi	Baghirmi-o
.24	Maba	Maba-o
.25	Groupe des langues parlées par les négres du Haut-Nil. (Chilouk, Dinka, Nouer, Beri)	Grupo de la lingvoj parolataj de la negroj de la alta-Nilo (Silukoj, Dinkoj, Nueroj, Berioj)
=965.1	Langues nubiennes	Nubiaj lingvoj
.2	Langue des Pouls. Foulbé	Fulbe-o

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 15, n-ro 1/2 (1965)

7.01 (520)

ESENCO DE LA JAPANA ARTO

(prelego en Internacia Somera Universitato, Harrogate, 1961.)

Prof. Dro Hideo Yagi, Japanujo

Antaŭparolo

Estimataj Gesamideanoj,

La temo de mia parolado estas »Esenco de la Japana Arto« Ĝi estas ion malfacila temo, ĉar oni povus tuŝi diversajn flankojn de la afero, kiuj estus malsamaj laŭ vidpunkto de la aŭtoroj. Tie ĉi mi volas nur skizi mian propran opinion rilate al tiu interesa, sed malfacila temo. Dum la parolado mi volas montri al vi koloritajn lumbildojn por ke vi povu kompreni min pli bone, vidante aktualajn objektojn.

Mi pensas, ke en la Japana arto troviĝas du elementoj, unu estas propre propra japana kaj la alia eble importita el la kontinento, ĉefe el la ĉina lando. La antaŭa havas tipon de karakterizaĵo »simpla kaj maldeksta aŭ malluksa«, kaj la alia, kontraŭe, »pompa kaj luksa«. La unua estas sindetenema kaj kompreneble tute rafinita. Ĝi estas influita de Budhalamo kaj precipe de »Zen« sekto kaj ĝi enhavas nuancon de maldekta kaj rezigno. La dua estas malpli rafinita, sin amuziga, infanema kaj vivanta. Tiu ĉi du elementojn oni povas vidi en diversaj flankoj, k. e. domo, palaco, ĝardeno, pentraĵo ktp. Tamen, mi diras, ke la unua tipo de simpleco estas esence propra japana arto, kreita en la longa historio de Japanujo, estas nome la ĉefa japana arto. La alia estas almenaŭ tipo, kiu tamen ofte rompas monotonion, donanta ŝanĝon aŭ variadon.

Konstruaĵo

1) Kastelo

Kastelo estas loĝejo de feŭda sinjoro en la Mezepoko en Japanujo. Ĝi estas konstruita sur monteto kaj donis imponan elrigardon. Sed, la unua estas ĉiam blanka kaj nur tiu ĉi blanka koloro regis la tutan